# *Forfalas Rajoy, Pedro Sánchez estas la nova prezidento de Hispanio.*



Madrido, 1 jun (RHK) La prezidento de la hispana registaro Mariano Rajoy, estis forfaligita ?i-vendrede per mocio de deklaro de nekonfido en la Parlamento, kaj estis anstata?igita de la socialista Pedro Sánchez.

La mocio impulsita de Sánchez, nova prezidento de la hispana registaro, ricevis subtenon de plimulto da deputitoj de la malalta ?ambro, entute 180 el 350, informis la  agentejo AFP.

Tiamaniere, “estas aprobita la mocio pri deklaro de nekonfido” kaj Sánchez estas konsiderata kiel investita de konfido flanke de la ?ambro”, esprimis la prezidantino de la konsilantaro de deputitoj, Ana Pastor.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/163568-forfalas-rajoy-pedro-sanchez-estas-la-nova-prezidento-de-hispanio

# Radio Habana Cuba